



10

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

OKTOBRO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * Al persista laboro renkonte al la 48-a UK	1
Atanas D. Atanasov — Ada. Leciono de Esperanto	3
Ivan Draganov. Pri la parolantaj rondoj	4
Rosica Georgieva. La instruista fakkunsido	5
Asen Grigorov. Laboro (versaĵo)	7
Kina Uzunova. Aŭtuno (versaĵo)	7
Mihail Langov. Nevenkebla floro (versaĵo)	7
Mladen Isaev. Noktoj blankaj (versaĵo)	7
Observanto. Esperanto servas la pacon	8
Irena Skorupa. Ĉu ekzistas homoj kun koroj	9
Dimo Trudoljubov. Nia sperto	11
* * * Organiza vivo	12
D-ro Nagi István. Amikeco, kongreso kaj maro	15
* * * Tra la gazetaro	16

Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm² ; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 1 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/1 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



AL PERSISTA LABORO RENKONTE AL LA 48-A UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO!

Ne estas bulgara esperantisto, kies koro ne emociĝus pro la penso, ke venontjare en la ĉefurbo de nia patrio okazos la 48-a Universala Esperanto-Kongreso. Kaj tio estas tute natura. Antaŭ ni aperas la ebleco ne nur ma ifestacii plej malavare nian bulgaran gastamon, sed ankaŭ por unua fojo partopreni amase internacian Esperanto-kongreson. Ordinare estas malgranda la nombro de la feliĉuloj, kiuj povas viziti tian kongreson, speciale kiam ĝi okazas en tre malproksima lando de la nia. Kaj nun, ni mem estos dommastroj, kiuj akceptos multnombrajn reprezentantojn de la esperantistaj medioj el la tuta mondo. Ni komprenas, ke tio estas alta honoro por ni, esprimo de granda fido de la monda Esperanto-movado en la personeco de ĝia plej aŭtoritata organizaĵo — UEA.

Ĉio ĉi ĝojigus nin kaj ne povas ne ĝojigi nin. Tamen ĝi ankaŭ devigas nin tro multe. Eble iuj el ni ankoraŭ ne povas klare imagi, kiaj respondecoj devenas de tiu ĉi fakto. Sed oni renkontas jam multajn, kiuj eĉ ne estante esperantistoj, demandas plenzorge, ĉu ni faras ĉion necesan, por ke ni sukcese plenumu la devenantajn tre seriozajn taskojn pro la okazigo de la 48-a UK en Sofio.

Kion senprokraste oni devas entrepreni nun konekse kun la preparo de la kongreso?

Antaŭ ĉio — la societaj estraraj devas klarigi al ĉiuj niaj anoj kiel oni devas fari la elekton de tiuj esperantistoj, kiuj povos kun plej granda utilo partopreni la diversajn kongresajn entreprenojn, ĉar la nombro de la kongresanoj el Bulgario ne estas kaj ne povas esti senlima. El ĉiuj dezirantoj oni devas elekti tiujn plej aktivajn esperantistojn, kiuj regas bone Esperanton kaj ankaŭ kiuj konas la pasintcon, la estantecon kaj la estontan evoluon de nia lando, kiuj konas la ekonomiajn kaj kulturajn atingaĵojn de nova Bulgario kaj ĝiajn naturajn rimarkindaĵojn. Nur tiaj esperantistoj povus respondi kontentige al la multnombraj demandoj, kiujn direktos al siaj bulgaraj amikoj niaj eksterlandaj gastoj.

Pro tio estas necese plenigi sisteme la informojn de tiu karaktero, kaj la societaj organizu prelegojn de bone preparitaj lektoroj en la organizaj kaj klerigaj kunvenoj de siaj membroj. Kio koncernas la lingvon, tiuj kiuj bone ĝin regas ili povus ricegi kaj freŝigi sian esperantan konversacian praktikon kaj forigi la allasatajn erarojn, enirinte en organizitajn de la societo studrondojn por progresintoj, kie oni parolos nur en Esperanto. Tiel, egale kun la zorgo por organizo de kursoj de Esperanto por komencantoj, oni devas turni seriozan atenton al la repreparo de la relative spertaj esperantistoj.

Tiel preparitaj, ni povos komplezi sperte kaj kulture ĉiun, kiu turnos sin al ni per iu demando. Kaj kiom agrable estos por la eksterlandano-esperantisto ricevi en tia okazo klaran, precizan kaj argumentan respondon. Sed por ke oni atingu tion, estas necese, ke ni mem regu libere la faktojn el nia vivo, konu la forpasitan vojon kaj ankau tiel la direkton de nia evoluo antaŭen. Tiam unu vigla, natura, amika interparolo povas fariĝi bona komenco de granda amikeco kun eksterlanda esperantisto kaj lasi plej longedaŭrajn rememorojn dum la tuta vivo.

Tre urĝa tasko de la societaj estraroj estas aranĝi aliĝon al la kongreso de la elektitaj laŭ la supra maniero esperantistoj. Plej malfrue, ĝis la fino de oktobro devas esti bone plenigitaj la kongresaj aliĝiloj kaj kune kun la necesaj kotizoj senditaj al la montrita adreso (48-a Universala kongreso, p. k. 44). Estus bone, se LKK estas informita, kiom da dezirantoj aktivaj esperantistoj ne povis aliĝi en la anticipe difinita nomaro, por ke oni konsideru ilin en eventuala kompletiga akcepto de kongresanoj, se malfermiĝos tia ebleco.

Devas esti anticipe klare, ke malfermiĝo de similaj eblecoj por partopreno de multe pli da bulgaraj esperantistoj en la laboro de la kongreso dependas precipe de la agado, kiun ni disvolvos por venigi pli grandan nombron da esperantistoj el la okcidentaj landoj en Sofion. Ĉar kiel bazon de la nombro de kongresanoj el la diversaj regionoj de la mondo estas akceptita la principo de la korelativeco, en tia okazo ju pli da esperantistoj venos el la okcidentaj landoj, des pli kreskos la anticipe difinita nomaro de partoprenontoj el Bulgario. Pro tio la societoj organizu per la helpo de siaj membroj vastan korespondan kampanjon por varbo de pli granda nombro da kongresanoj el la nesocialismaj landoj.

Samtempe ni ankoraŭ foje memorigas, ke la eksterlandaj esperantistoj, laŭ la kongresa regularo pagas kongreskotizon al UEA. Nek Bulgara Esperantista Asocio, nek LKK havas rajton akcepti kotizojn de ili. Jen pro kio ni petas, ke oni ne malfaciligu la agadon de Lo-Ko-Ko per superflujaj proponoj akcepti kongreskotizon de bulgaraj esperantistoj por iliaj korespondantoj el eksterlando.

Estas klare, ke de ni kaj de nia laboro dependas en alta grado la amasa vizito kaj la bonega okazigo de la 48-a Universala Esperanto-Kongreso en Sofio.

Ni dediĉu ĉiujn niajn fortojn por modela plenumo de tiu honora tasko!

Tiel ni montras al la tuta internacia Esperanto-movado, ke ni estas disciplinita kaj konscia taĉmento en la vicoj de nia komuna internacia organizado — UEA.

Tuj abonu en la loka poŝtejo al „Bulgara Esperantisto“, „Paco“ kaj „Internacia Ĵurnalistoj“! La societoj bone organizu la abonigan kampanjon. Ne prokrastu!

Fina templimo — 20-a de decembro.

Leciono de Esperanto

Deka leciono

Feliĉe ni alvenis en la kursejon ĝustatempe — sen malfruigo.

Unu minuton post nia alveno eniris la ĉambren ankaŭ la instruisto. Mi sciigis al li pri la ĉeesto de miaj du amikoj kiel gastoj. Li volonte konsentis, ke ili restu kaj aŭskultu la lecionon.

— Nun, gekamaradoj — li diris — ni komencu nian laboron. Unue ni ripetu koncize la materialon, kiun ni lernis en la lasta leciono. Kiam ni havis la lastan lecionon? K-do Aleksandrov, diru, mi petas.

Aleksandrov. — La lastan lecionon ni havis vendrede la okan de marto.

La instruisto. — Kaj kion ni lernis tiam?

Aleksandrov. — Ni lernis pri la sufiksoj EM kaj UL.

La instruisto. — Ĉu la tutan horon ni okupis nin nur pri la du sufiksoj? Respondu vi, K-dino Spasova.

Spasova. — Ni lernis ankaŭ pri la uzo de volitivo en la kazoj, kiam oni ne povas uzi infinitivon.

La instruisto. — Bone. K-do Stoev, donu ekzemplon pri la sufikso EM.

Stoev. — „Babilema“.

La instruisto. — Kaj mi petas K-dinon Nikolova doni ekzemplon pri la sufikso UL.

Nikolova. — „Belulo“.

Petrov. — „Babilemulo“.

La instruisto. — Jen trafa ekzemplo, kiu entenas ambaŭ sufiksojn. Sed mi preferus, ke alian fojon K-do Petrov ne aŭdigu sin antaŭ ol mi donas al li demandon.

Petrov. — Mi kulpas. Mi petas pardonon. . .

La instruisto. — Hodiaŭ ni legos la artikoleton „Pri la egiptaj piramidoj“. Malfermu la librojn je la paĝo 58. Kiu deziras legi? (Ĉiuj levas la manojn). Mi vidas, ke ĉiuj estas lege maj, sed ne estas eble, ke ĉiuj legu. Hodiaŭ mi preferas, ke Lazarov legu.

Lazarov legas kelkajn minutojn. La artikoleto estas mallonga. La ceteraj kursanoj sekvas la tekston en siaj libroj.

Post tio la instruisto donis kelkajn demandojn kaj klarigis novan regulon de la gramatiko. Ĉiu el ni devis verki ekzemplojn kun apliko de la nova regulo. Poste, laŭ invito de la instruisto, la kursanino Kostova rakontis libere (per propraj vortoj) la enhavon de la artikoleto. Ŝi povis senerare ripeti la dimensiojn de la piramido de la egipta faraono Heopso: alta 140 metrojn, longa kaj larĝa ĉe la fundamento 232 metrojn: kaj tiun piramidon oni konstruis 3700 jarojn antaŭ Kristo!

Fine la instruisto turnis sin al ni per la jenaj vortoj:

— Gekamaradoj, jam du monatojn vi lernas la internacian lingvon. Ĉu vi ne sentas, ke vi havas jam sufiĉe da konoj por eniri en rilatojn kun la mondo? Jen mi disdonas al vi adresojn de korespondemaj esperantistoj el diversaj landoj. Mi deziras, ke ĉiu el vi korespondu kaj trovu amikojn en la vasta mondo.

La instruisto donis ankoraŭ kelkajn gvidkonsilojn pri la verko de leteroj kaj disdonis adresojn. Mi ricevis tri adresojn de esperantistoj el tri landoj.

Venis la fino de la leciono. Kiel kutime ĝi daŭris 45 minutojn.

Dum la kursanoj disiris, mia amiko Marko proksimiĝis al la instruisto kaj donis al li kelkajn demandojn. Laŭ la vizaĝo de Marko mi komprenis kiom impresis lin tio, kion li vidis kaj aŭdis dum tiu ĉi horo.

Ni eliras sur la straton. Nikolao estas ekster si pro entuziasmo. Marko marŝas silente kaj meditas.

Proverbo. — Pro guto post guto disfalas granito.

UZO DE AKUZATIVO KIEL ADVERBA ESPRIMO (por esprimi cirkonstancon, tempon, mezuron).

Tutan horon (dum tuta horo) mi legis la ĵurnalon.

Kiun tagon (en kiu tago) vi vizitis nin?

Iun tagon (en iu tago) li renkontis sian onklon sur la strato.

La dekan de junio (en la deka tago de junio) li venos.

Kilogramo da pomoj kostas 150 frankojn.

La katedrala preĝejo en nia urbo estas alta kvindek metrojn.

La vojo inter la du vilaĝoj estas longa dekdu kilometrojn; oni devas marŝi tri horojn, por iri de la unu en la alian.

EN ESPERANTO LA AKUZATIVO SERVAS :

- a) por montri la *objekton de ago* (rekta komplemento) — vidu lecionon 1.
 - b) por esprimi la *celon de almovo* (konkretan aŭ abstraktan) — vidu lecionon 8.
 - c) por formi *mallongajn esprimojn kun adverbeca senco*, kiaj estas la supraj ekzemploj.
- Noto. — Nun la instruanto povas fari pli detalan rekapitulacian trarigardon pri la uzo de la akuzativo, donante plurajn ekzercojn pri ĝiaj funkcioj kiel rekta komplemento ktp.

PREFIKSO

DIS montras, ke la ago estas farata al diversaj flankoj, en plurajn direktojn: disĵeti — ĵeti al diversaj flankoj, en diversajn direktojn; disdoni — doni al multaj homoj, kiuj estas ĉirkaŭe; dissendi la gazeton; dissemi; ni disiris (ni iris en diversajn direktojn).

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ

Vi havas sufiĉe da konoj = vi havas sufiĉajn konojn.

Mi veturas al Parizo. Mi veturas en Parizon. Mi veturas Parizon. (*En la lasta pozicio la akuzativo esprimas sufiĉe la direkton kaj oni povas ne uzi prepozicion*).

Eniri la ĉambron = eniri en la ĉambron.

Enhavi = havi en si. La libro enhavas rakontojn kaj versaĵojn. Enhavo de libro: tabelo de enhavo.

Enteni — teni en si, havi en si. La akvo entenas hidrogenon.

Aŭdigi sin: Li aŭdigas sin = li faras, ke oni aŭdu lin.

EKZERCOJ

1. Kompletigu:

Tut... tag... ni pasigis en la vilaĝo.

Li atendis antaŭ ŝia pordo tri hor...

Unu jar... li loĝis en Parizo.

Mi ne povas viziti lin ĉi... tag...

Nur unu f j... li legis tiun libron kaj ĉion li memoras.

Ali... foj... ne manĝu tian panon!

Ki... tag... vi estos libera?

La sep... de oktobro ni povos jam forveturi.

La libro kostas nur ducent frank...

2. En la sekvantaj propozicioj aldonu al la verboj la sufikson DIS kaj uzu, kie necese la substantivojn en pluralo.

Li sendis libron al sia amiko. (Li dissendis librojn al siaj amikoj).

Georgo perdis sian kajeron.

La instruisto metis la kajeron sur la benkon.

Mia onklo portis pomojn al la parencoj.

La laboristo batis la ŝtonon per granda murtelo. Pecoj de la ŝtono saltis ĉirkaŭe.

Ni jetos tiujn ĉi paperojn.

La vento blovas liajn harojn.

PRI LA PAROLANTAJ RONDOJ

Je la 20-a de aŭgusto 1962 k-do Nikola Aleksiev rakontis antaŭ la kunveno de societo „Maksim Gorki“ siajn impresojn pri la ĵus pasinta 47-a universala Esperanto-kongreso en Kopenhago. Li detale priskribis ĉion, kion li aŭdis kaj vidis, kaj speciale pri la partopreno de la bulgara esperantista delegitaro. Ĝi faris bonan impreson al la kongreso per sia agado kaj samtempe

ĝi sukcesis fari bonan propagandon por nia lando. Multe da kongresanoj tuj esprimis deziron viziti Bulgarujon, la landon de Georgi Dimitrov, la landon de la rozoj kaj la landon de la socialisma sociordo.

Tio, tamen, devigas nin eklabori pli intense, ke ni preparu nin por ke la 48-a Universala Kongreso okazu sukcese. La tuta ŝarĝo falos sur la dorson

de la sofiaj geesperantistoj, kaj speciale sur la Centran Komitaton de Bulgara Esperantista Asocio.

Pro tio oni devas mobilizi ĉiujn esperantistojn de la tuta lando, kaj speciale tiujn, kiuj deziras viziti la kongreson.

La unua kondiĉo por ke ni povu prezenti nin antaŭ niaj fremdlandaj gastoj kiel bonaj esperantistoj, estas, ke ni devas uzi la lingvon perfekte kaj senerare.

Jen, pro kio mi rekomendas al ĉiuj la aktivecon de kelkaj sofiaj esperantistoj, kiuj formis parolantan rondeton de Esperanto. La celo de la rondeto estas: per klarigo de iuj gravaj reguloj, per rerakontoj, kaj speciale per interparolado, en kiu partoprenas ĉiuj rondanoj — atingi perfektigon en la uzado de Esperanto, prepari sin por la kongreso, kiu okazos en Bulgario.

La rondeto komencis sian agadon je la 17-a de majo 1962 kaj kunvenas nur unu fojon semajne, sed la rezultoj estas pli kaj pli bonaj. Mi trovas, ke tiajn rondetojn oni devas organizi en ĉiu loĝloko, kie estas esperantistoj.

En nia parolanta rondo estas enkondukita koresponda metodo: dum la semajno la rondanoj skribas mallongajn

leterojn al la gvidanto de la rondo. Li kontrolas la leterojn, korektas kaj re-sendas ilin al la sendintoj. En la proksima kunveno li klarigas la gravajn erarojn kaj regulojn. Tiamaniere ni atingas pli kaj pli bonajn sukcesojn. En la kunveno ĉiuj parolas nur en Esperanto.

Ĉiu rondano korespondas (kaj devas korespondi) kun iu fremdlanda esperantisto. En siaj korespondadoj li rakontas pri nia bela lando, pri la historiaj kaj kulturaj monumentoj, pri la granda socialisma konstruado en nia lando, pri la rapidaj ŝanĝoj kaj pribonigoj de la kultura, la ekonomia kaj la socia vivo de nia popolo, pri niaj belegaj ripozejoj (ekzemple „La Suna Bordo“ kaj „La Ora Strando“ kaj aliaj). Tiel niaj korespondantoj ekdeziros viziti nepe nian landon kaj speciale la 48-an kongreson.

Tiajn parolantajn rondojn kaj la korespondan metodon mi rekomendas al ĉiuj en la lando.

Ni laboru por nia lingva perfektigo, por la bona renkonto de niaj eksterlandaj gastoj kaj por la sukceso de la 48-a kongreso.

iv. Draganov

LA INSTRUISTA FAKKUNSIDO

La 16-an de julio j. k. en Burgas dum la 35-a esperantista kongreso okazis la instruista fakkunsido, kiun gvidis Iv. Sarafov. Li parolis pri la stato de la esperantaj kursoj kaj ekzamenoj, pri la lernolibroj kaj Esperanto-bulgara vortaro, pri la provlecionoj aperantaj en „Bulgara esperantisto“, kiujn ni devas nepre daŭrigi. En la fino li diris, ke oni intencas organizi konferencon por interŝanĝo de sperto, kiun devas partopreni ĉiuj kursgvidantoj. Dum la 48-a Universala Kongreso okazos internacia kurso por kursgvidantoj kaj oni organizos infanan kongreseton, en kiu devas partopreni ankaŭ bulgaraj infanoj.

En la diskutoj partoprenis multaj instruistoj-esperantistoj. Simeon Ĥesapĉiev parolis pri la lingvo-nivelo de la bulgaraj esperantistoj kaj pri la rimedoj por ĝia plibonigo. Metodi Panĉev insistas pri la daŭrigo de la rubriko „Por la kursgvidantoj“; li aprobas la okazigon de konferenco je temo „Instruado de Esperanto“ kaj de seminario dum la somero je la sama temo. Vasil Bozarov opinias, ke la Ministerio de la Klerigo kaj la Kulturo devas helpi al ni por malfermo de kursoj, eldono de lernolibroj kaj helpiloj, sed ni devas labori ankaŭ laŭ la lokaj kondiĉoj. Ĥristo Markov opinias ke ni devas eldoni ankaŭ lernolibrojn por infanoj. Ivan Zahariev parolas pri sia sperto pri infanaj kursoj kaj pri sia laboro kun leĝejo „Iskra“ Ivan Popov starigas la demandon pri la kurso por kursgvidantoj en Drujevo kaj pri sia sperto de la instruado en Jambol. Ĥristo Manolov detale prezentis sian sperton en la lernejo, kies direktoro li estas kaj kiamaniere oni devas agi por atingi konkretajn sukcesojn. En lia lernejo

oni pagas al la lektoroj por la instruado de Esperanto en la studrondetoj. Li aprobas la okazigon de metodika konferenco. Metodi Popov opinias, ke nia instruado sukcesos se ni havos lernolibrojn. Sen lernolibroj oni ne povas sukcese labori. Ivan Momčilov same opinias ke sen lernolibroj oni ne povas instrui kaj eduki. La aĝuloj bezonas du lernolibrojn laŭ sia lingvonivelo. Jordan Iliev insistas pri paŝoj antaŭ la Ministerio por pago al la Esperanto-instruistoj*. Rosica Georgieva esprimis bedaŭron ke dum la nuna fakkunsido oni ne okazigis provlecionon por interŝanĝo de sperto, montrante kiel oni devas sukcese instrui la lingvon. Ŝi esprimis la unuaniman decidon de la fakkunsido, ke la Ministerio de la Klerigo kaj la Kulturo devas helpi al ni en la disvastigo kaj instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj. Ni laboros pli obstine per Esperanto por mondpaco.

Rosica Georgieva

Noto de BE. Ni memorigas, ke en la distriktoj de Târnovo, Tolbuhin, Jambol k. a. tiu ĉi demando estas aranĝita dank' al la aktiveco kaj la klopodoj de la lokaj societoj. Ni devas klopodi en la Ministerio, sed se ni ne sukcesos tie, ĉu ni devas atendi? Estas multe pli facile en ĉiu distrikto aparte enkonduki niajn kursojn en la sistemon de la lernantaj studrondoj kaj ni devas nepre klopodi tiudirekte. Multaj esperantistoj insistas por klopodoj en la Ministerio kaj ili mem nenion faras en ilia distrikto. Sed ni devas agi samtempe en tiuj du direktoj. En tiu senco nin devigas ankaŭ la kongresa rezolucio (vidu p. 8!).

GRAVA SCIIGO POR LA INSTRUISTOJ

Eble multaj el la instruistoj jam scias, ke antaŭ nelonge estas fondita la internacia koordinado de Esperanto-kursoj „Ora Spiko“. La internacia amikaro „Ora Spiko“ havas kiel celon disvolvi la kulturajn kaj turismajn interŝanĝojn inter la gelernantoj de diversaj Esperanto-kursoj.

Por pluaj detaloj vi povas turni vin al la bulgara iniciatinto Petko Arnau-dov, str. N. Popkonstantinov 38, Pazarĝik.

48 UNIVERSALA KONGRESO

Sofio, 3—10 de aŭgusto 1962

Jam venis la unuaj aliĝoj de la plej fervoraj esperantistoj. Jen la statistiko laŭ landoj (ĝis la fino de septembro): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 1, Belgio 2, Brazilo 2, Britio 16, Bulgario 28, Danlando 6, Finnlando 5, Francio 29, Germanio 9, Hispanio 3, Hungario 2, Israelo 1, Italio 9, Japanio 3, Jugoslavio 13, Negerlando 9, Norvegio 3, Nov-Zelando 1, Pollando 4, Svedio 12, Svisio 2, Usono 1.

Ertute aliĝintoj 163 el 24 landoj.

Nur la bulgaraj esperantistoj rajtas sendi la kongreskotizon kaj la aliĝilon al LKK, p. k. 44, Sofio. La bankkonto de LKK, al kiu oni devas sendi la monon estas: 105ĉ/2993, BNB, Sofio. La aliĝiloj devas esti tre klare, ĝuste kaj komplete plenigitaj. Ili estas sendataj al LKK pere de la societo. Malakurate skribitaj aliĝiloj ne estas konsiderataj.

Gesamideanoj! Ne prokrastu la aliĝon, ĉar la nombro de la bulgaraj kongresontoj estas limigita kaj LKK akceptes aliĝilojn ĝis la atingado de la difinita nombro. Krome, la frua aliĝo donas avantaĝojn en la kongresaj aranĝoj.

Ni atentigas, ke neniu povos partopreni la kongreson sen kongreskarto.



48 UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO



S O F I O . 3-10 VIII 1962

LABORO

Ĉion kreas en la mond'
la labor' de l' homo :
ŝipo, vagonaro, pont'
kaj uzin' kaj domo.

Vi klopodas pri fabrik'
li — pri gren' printempa,
pri scienco — ĉi amik'
mi — pri la „Nuntempa“.

Ĉiu viro kaj virin'
agas kun aktivo,
kaj kreigas ĉe la fin'
nia nova vivo.

Tial estas ĉiam pli
niaj tagoj helaj,
tial mi kaj vi kaj li
estas sensancelaj.

Ni kreas sen hezit'
kun fervor' sindona,
por ni estas la milit'
krimo plej malbona.

Tial ni al la patruj'
volas ĉion doni,
eĉ la vivon pretas tuj
doni, se bezone.

Por ni ĉiu estas frat'
kiu volas pacon,
sed renkontos ni per bat'
la militminacon.

Ne blindigas nin la flam'
de la naciismo,
ĉelas ni al homa am',
al socialismo.

Asen Grigorov

AŬTUNO

Aŭtuno orhara belega
vi ĉie potence nun regas.
En foraj arbaroj kaj kampoj
aŭdiĝas nek birdoj, nek kantoj.
Koloris vi l' arbofoliojn
per ruĝaj kaj flavaj farbstrioj.
Kaj suden forflugas la gruoj
kun krioj malgajaj kaj bruoj.
Sed malgraŭ soleco en koro,
en kampoj plugadas traktoroj —
kaj semojn en grundon la tempo
semadas por nova printempo.

Kina Uzunova,
Umarevci

La Bulgara-Soveta amikeco estas
por ni vive necesa, kiel la aero kaj la suno
por ĉiu vivanta estajo.

Georgi Dimitrov

Ĝi ja estas mire bela floro,
nevelkebla kaj neordinara.
Ĝi plensange floras en la koro
tre profunde de popol' bulgara!
Tie floras ĝi plensange, vere
kaj radias ĝi vivigan forton.
El ĝi fontas ĉiam senrezerve
flama amo kaj impet' senborda.
Vent' nenia povas ĝin disrompi,
frost' nenia povas ĝin velkigi —
ĉiam floras ĝi plensange, poupe
kaj efikas ĝi per fort' viviga!
Ĝi ja estas mire bela floro,
nevelkebla kaj neordinara.
Ĝi plensange floras en la koro
tre profunde de popol' bulgara!

Mihail Langov

Mladen Isaev

* * *

Noktoj blankaj kiel osto.
Flavaŭtuno. Nigra mort'.
Sub salikoj de Ogosto*
freŝaj tomboj en senord'.
En vesper, patrinoj venas
al ĉi tiu bord' en trist'
kune kun dolor' venena
pro murdita komunist'.
Noktoj blankaj kiel osto.
Flavaŭtuno. Nigra mort'.
En la kampoj ĉe Ogosto
lupoj muĝas en kohort'...

1930

El bulgara: **Canko Murgin**

* Nomo de rivero en nord-okcidenta Bulgario. En tiu regiono eksplodis kun plej granda forto la popola kontraŭfaŝista ribelo en septembro 1923.

*Tuj aliĝu al la Universala kongreso!
La kotizon sendu al: 48-и световен есперантски конгрес,
БНБ — София, с/ка 1054/2993!*

ESPERANTO SERVAS LA PACON!

La blankaj metalaj birdoj forportis ilin malproksimen en la landon de la blankaj noktoj, en la landon de la sennombraj lagoj — Finnlando.

La varmaj bulgaraj koroj enfluis en la fajron de la 18.000 ekflamitaj torĉoj, en la vicojn de la junaj batalantoj por paco kaj amikeco, venintaj al la festivalo de ĉiuj partoj de nia planedo.

Helsinki fariĝis centro de monda fôrumo!

Tie estis laboristoj, vilaĝanoj, inĝenieroj, artistoj, studentoj . . . esperantistoj.

La unua Esperanto-renkontiĝo en la kadro de la festivalo okazis en ĉambrego de la laborista domo „Kulturitalo“, je la 29-a de junio, antaŭtagmeze. Ĉeestis 43 geesperantistoj kaj 14 gastoj el 14 landoj.

La elektita prezidantaro prenis sian lokon: Al. Dimitrov (Bulgario), Jarvinen (Finnlando), M. Turpejnen (Finnlando).

Konvinke sonoras la vortoj de la prezidanto, prezentante la ĉefan prelegon: „Ni devas ne nur disvastigi sukcese la lingvon inter niaj gekamaradoj, inter la junularo, sed doni ĉiujn niajn fortojn, nian junan energion kaj entuziasmon por ke nia movado helpu la plifirmigon de la paco sur la tero, por la likvido de la hontegaj restaĵoj de la koloniismo, por amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj.“

En la prelego estis farita resumo de la nuntempaj politikaj cirkonstancoj; estis kritikita la pozicio, kiun la estraro de UEA okupis kontraŭ la festivalo; estis klarigita la politiko de paca kunekestado kaj la taskoj de la esperantismo konekse kun ĝi.

Kun plezuro la preleganto konstatis: „Nun miloj da esperantistoj, Esperanto-societoj kaj kluboj en la tuta mondo, dekoj da Esperanto-asocioj laboras por paca interkompreniĝo inter la popoloj; faciligas la personajn kontaktojn inter la homoj, helpas por fortigo de antaŭjuĝoj kaj eraroj, spertitaj en daŭro de jarcentoj, rezultoj de naciaj malamikecoj kaj ŝovinisma propagando.“

La prelego estis aŭskultita kun atento kaj aplaŭdita aprobe.

Poste prenis la parolon la reprezentatoj de Jugoslavio, Finnlando, Hungario, Svedio kaj Okcidenta Germanio. Ili subtenis la gvidlinion de la paca kunekestado kaj rakontis, kiel la esperantista movado en iliaj landoj laboras por la paco.

La teksto de la proponita de la prezidanto malfermita letero al 47-a kongreso de UEA en Kopenhago, per kiu la esperantistoj-festivalanoj protestas kontraŭ la bojkoto rilate al la festivalo, efektivigita de la estraro de UEA, estis akceptita unuanime. La finno Turpejnen legis la salutleterojn al la renkontiĝo. Estis akceptitaj salutleteroj al la Esperanto-prepara konferenco en Sovetunuo, al la internacia esperantista laborbrigado en Jugoslavio kaj aliaj.

La bulgaraj delegitoj transdonis donacojn al la organizantoj kaj la partoprenantoj — librojn, albumojn, surlignajn desegnaĵojn, prospektojn ktp. Je la nomo de ĉiuj dankis M. Turpejnen.

La prezidanto invitis la ĉeestantojn partopreni la 19-an kongreson de TEJO en Vraca kaj la 48-an kongreson de UEA en Sofio dum 1963. Post kelkaj vor-

toj pri Bulgario li fermis la kunvenon per la vortoj: „Ĝis revido en Vraca, kie okazos venontjare la kongreso de TEJO.“

Sekvis komuna fotografado de la partoprenintoj. Korespondanto de radio „Varsovio“ intervjuis la delegitojn Cv. Petkov (Bulgario), M. Turpejnen (Finlando) kaj Sl. Zlatnar (Jugoslavio).

Dum la dua renkontiĝo-balo, okazinta en la Internacia Klubejo la 31-an de julio vespere, la prezidanto de la Finnlanda MEM-sekcio M. Turpejnen dankis je la nomo de la finna organiza komitato al la bulgara reprezentanto Al. Dimitrov pri la helpo dum la organizado de la renkontiĝo kaj la esperantista ekspozicio kaj esprimis sian miron pri la grandeco kaj la varia agado de la bulgara esperantista movado, prezentante ciferojn kaj faktojn.

La balon partoprenis gastoj de la finna, kuba, soveta, brazila kaj itala delegitaroj.

En la personaj renkontiĝoj kun finnaj kaj alilandaj esperantistoj la bulgarioj klarigis vicon da ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj problemoj, starantaj antaŭ la bulgara popolo.

Ĉie ili ricevis afablan akcepton kaj helpon en la ĉiutaga laboro.

Observanto

UNUA LITERATURA KONKURSO POR LA PREMIO „J. E. S.“

Regularo.

1. J. E. S. — Junulara Esperanto-Studrondo en Malmö estigas inter ĉiuj ĝis 25-jaraĝaj geesperantistoj literaturan konkurson por la premio „J. E. S.“.
2. La konkurso estas anonima. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj en aparta fermita slipo, oni aldonu siajn nomon kaj adreson.
3. La prozaj aŭ poeziaj konkursaĵoj, en nelimigita kvanto, estu senditaj en tri maŝinskribitaj ekzempleroj al la Sekretario de la Konkurso.
4. La juĝkomisio havas je dispono du premiojn: unua de 100 svedaj kronoj kaj dua — 50 svedaj kronoj.
5. En la konkurso ne rajtas partopreni la anoj de J. E. S., nek la juĝantoj.
6. „KVINPINTO“ — organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, detenas por si la rajton publikigi la premiotajn kaj aliajn konkursaĵojn.
7. Limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 15-a de decembro 1962. La rezulton oni diskonigos la 28-an de januaro 1963.

Sendu ĉion al

Franco Luin, „JES÷Konkurso“,

Dag Hammarskjölds väg 2.

LUND, Svedio.

ĈU EKZISTAS HOMOJ KUN KOROJ?

En preskaŭ ĉiuj epokoj vivis homoj, kiuj deziris ekkoni la mondon, admiri la ĉirkauaĵon, konatiĝi kun kutimoj, grimpi montojn, promeni en urboj. Sed ĉu ili veturis nur pro tio? Aŭ ĉu ili eble ne veturis pro la amikeco?

Unu tagon, mi diris al mi mem: „Trovu la amikecon, la bonajn korojn“. Ĉu mi trovis tion, kion mi volis?

7-an de julio 1962 mi forveturis al Bulgario, kie mi trovis multajn amikojn. Ili ĉiuj, senescepte, akceptis min varme dum mia preskaŭ dumonata mig-

rado. Ili donis al mi tranoktejon, invitis al mango, montris la belajn ĉirkaŭaĵojn, eĉ ne volis lasi min foriri. Vere mi ne atendis tion! Dum mia migrado mi sentis min kvazaŭ vivanta en Esperanto do mi ĉi tie tutkore dankas al ĉiuj amikoj kaj speciale al: ing. Simeon Simeonov el Sofio, Petko Arnaudov el Pazargik, Marin Alabašev el Varna, Petko Bonev el St. Zagora, Mihail Kostov el Ĉirpan, Hristo Petrov el Plovdiv, Maria Kojareva el Bansko, Kiril Kalčev kaj Donka Petrova el Loveĉ, Olga Barkova el Tárnovo, fam. Preslavski el Ruse, Olga Nica, Florin Caragea kaj Ludvig Welther el Bukureŝto, Evi Toth Lajosné, Lili Szelessné, Zoltan Mócsi kaj Gabor Farkas el Budapeŝto, Ludvik Chytil el Prérrov, fam. Vondraŭšek el Brno.

Do, en nia atomtempo troviĝas homoj kun koroj. Kaj ili estas multaj. Eble en la estonteco mi povos rekompenci iamaniere.

danka **Irena Skorupa**

CHORZÓW—BATORY, ul. Wrocławska 2
Pollando

ĈU NI FORLASU NIAN MONTODOMON?

Dum septembro k. j. oni vokis la anojn de la konstrua komitato de montodomo „Esperanto“ en departemento „Lesoparkove“. Tie ni ricevis la admonon, ke en plej baldaŭa tempo ni devas finkonstrui la montodomon. Se la esperantistaro ne povus fari tion, oni komisiis alian organizaĵon finpretigi kaj ekspluati la montodomon. La konstrua komitato certigis la respondecojn de la departemento, ke ni pretigos la konstruaĵon ĝis aŭgusto 1963, kiam ni planas ankaŭ ĝian inaŭguron.

Ni deklaris tion esperante, ke nek unu esperanto-societo, nek unu aparta esperantisto konsentus, ke oni forprenu de ni la montodomon kaj ke ĉiuj malavare kontribuos por ke ni disponigu la montodomon al la esperanto-movado dum la 48-a UK de Esperanto.

Pluraj geesperantistoj jam respondis al la admono per pli fervora laboro kaj per kontribuoj al la fonduso. Dank' al tio la montodomo jam havas konstantan eternitan tegmenton. Ankaŭ baldaŭ estos preta unu el la ĉambroj.

Novaj donacintoj

A. Penčovski	Sofio	2	lv	G. Petrov	"	5	"
P. Penev	"	2	"	P. Dimitrov	"	5	"
B. Sokolov	"	2	"	N. Vidinlieva	"	5	"
J. Bojinova	"	2	"	M. Šiškov	"	5	"
D-ro S. Kadiev	"	2	" (entute 3)	M. Benvenisti	"	5	"
ADA	"	2	" (entute 4.50)	S. Kostadinov	"	5	"
S. Hesapčiev	"	3	"	ing. S. Simeonov	"	10	" (entute 15)
S. Orozov	"	5	"	P. Ĉakova	"	10	"
I. Genov	"	5	"	A. Grigorov	"	10	" (entute 15)
B. Velickov	"	5	"	P. Noeva	"	12	"
P. Popnikolov	"	5	"	D-ro T. Todorov	"	5	" (entute 6.50)
D. Stankovski	"	5	"	I. Vasilev	Pazargik	2	"
H. Gorov	"	5	"	H. Paškulev	Karlovo	10	"
K. Drajev	"	5	"	H. Vankmuler	Munkovo	10	"
I. Keremidčiev	"	5	"	H. Thuman	Vieno	10	"
				Vietnama Esperanto-Asocio		12	"

Koran dankon al ĉiuj donacintoj! Specialan dankon ni direktas al k-do Jean Thomas, kiu laboris tutan tagon ĉe la montodomo kaj donacis 55 levojn. Ĝis nun neniuj donacis tiel grandan sumon. Lastatempe en pluraj loĝlokoj oni kolektas monon por la fonduso. Inter ili estas Plovdiv, Dimitrovgrad kaj Vraca.

Estas decidite, ke en la „Ora libro“ de la montodomo oni enskribu la nomojn de ĉiuj personoj kiuj iamaniere helpis la starigon de la montodomo. La societoj, kiuj donacis minimume 50 levojn kaj personoj donacintaj minimume 25 levojn estos konsiderataj fondintoj de la montodomo. Iliajn portretojn kaj koncizajn biografiajn notojn ni enmetos en la „Ora libro“. En la novembra numero de „BE“ ni publikigos la unuan liston de la fondintoj.

Gekamaradoj, tuj donu vian kontribuadon. Nun pli valoras la agoj ol la vortoj. Montru vian amon al la esperanto-movado helpante la konstruadon de la montodomo.

La estraro
de la Turista Sekcio „Esperanto“

N I A S P E R T O

En nia urbo — Jambol — la Esperanta movado al fino de 1960 jaro estis malprogresinta. La Esperanta societo ne estis farinta jarkunveno dum du jaroj. Dum 1960 la estraro de Esperanta societo havis nur unu kunsidon — je 18. XII. Por unu jaro estis aranĝitaj unu aŭ du esperantajn kursojn kun gvidanto Al. Blagoev, kiujn komencis 30—40 personoj, kaj finis 5—6. Tiuj kursaĵoj ne estis varbitaj por membroj de la societo. Rezultate tio la membroj de E-societo estis atingintaj 22, nur maljunaj homoj. Kaj nenia alia agado.

En la komenco de 1960 jaro (3. II.) estis elektita nova estraro de la Esperanta societo. Ĝi decidis serĉi novajn formojn por agado. Antaŭ ĉio ĝi volis propagandi inter urbanoj la lingvon internacian Esperanto. Kiel? . . . Tiam ĝi decidis, ke ĝi devas uzi la urban radio-servon. Estis elektita programa komisiono. La 17-an de aŭgusto 1961 estis farita la unua disaŭdigo. De tiam ĉiun jaŭdon je la dekokaj horoj en la mikrofonoj de la radio-servo eksonas: „Esperanto estas fenestro al la mondo!“

Dum unu jaro per la urba radio-servo estis efektivigitaj 58 disaŭdigoj inter ili: „La kleriga kaj eduka signifo de Esperanto“, „La laborista esperanta movado en Bulgario“, „Esperanto en servo de nia socialista patrolando“, „Por kolektiva korespondado“, „Esperanto en servo de paco“, „Esperanto kaj 24-a de majo — la tago de la slava skribo“, „La esperantistoj kaj antaŭstarantaj bataloj“ k. a.

Dum la verda propaganda esperanta semajno — kiu okazis de la 25-a ĝis la 30-a de septembro 1961 ĉiutage estis aranĝitaj disaŭdigoj, dank' al tio estis varbitaj ĉirkaŭ 150 gekursanoj. Ankaŭ dank' al la disaŭdigoj per la urba radio-

servo nia membraro atingis 186. Nun en nia urbo pri esperanto oni parolas kun estimo kaj atento.

Nun kaj dum la dua jaro la disaŭdigoj daŭras. La estraro de nia societo opinias, ke la uzado de la urba radio-servo por esperanta propagando estas pozitiva evento en nia agado kaj ĝi daŭrigos tiun aktivecon.

Dimo Trudoljubov

Noto de la redakcio. Ni opinias, ke multaj societoj povas ĉerpi el la sperto de la societo en Jambol. Ni atendas artikolojn pri la sperto de aliaj societoj.

LA UNUA VILAĜA ESPERANTO-SOCIETO EN SUDOKCIDENTA BULGARIO

En la komenco de la lasta majo en vilaĝo Ŝatrovo, distrikto Kjustendil estis organizita Esperanto-kurso de la aktiva esperantisto Georgi Manov Kaŝukeev. La kurson partoprenis instruistoj, medicinistoj kaj poŝtistoj. Ĝi komenĉiĝis kun granda entuziasmo kaj daŭris du monatojn en ĉiutagaj okupoj. Post la fino de la kurso, la kursanoj sin prezentis al ekzamenkomisiono, konsistanta el kamaradoj: Boris Drenski — prezidanto de la Esperanto-societo „Marek“ en St. Dimitrov; Petăr Stojanov — sekretario de la sama societo kaj la kursgvidanto. Gasto al nia vilaĝo estis ankaŭ la sekretario de BEA k-do Violin Oljanov. La ekzameno estis sukcesa. Kamarado Oljanov gratulis la kursanojn pro ilia bonega laboro en la kurso, pro iliaj kiopodoj kaj bondeziris al ili fervoran lernadon kaj perfektigon en Esperanto.

La 26-an de junio la entuziasmigita kursanoj, konatigintaj kun la celo kaj la taskoj de Esperanto, unuanime decidis fondi Esperantan societon, por ke ili povu organize lernadi kaj disvastigadi la internacian lingvon.

Unuanime la fondintoj nomis sian societon „Balkana konkordo“.

Post la fondo de la societo, k-do Oljanov kaj Drenski varme salutis la ĉeestantojn.

Ivan K. Filov



Vil. Ŝtrákvevo. Delonge la esperantistoj en vilaĝo Ŝtrákvevo sciis pri la alveno de kvar junuloj el urbo Crailshiem — GFR — la tri filoj de la konata esperantisto kaj antifaŝisto Bruno Vogelmann (Günther, Dieter kaj Oge) kaj ilia amiko Volker kaj invitis ilin viziti la vilaĝon kaj la lokan Esp. societon „Pacbatallanto“. Precize, laŭ la plano de ilia 7000 km. longa vojaĝo tra Aŭstrio, Jugoslavio, Grekio, Turkio kaj Bulgario, je la 32-a tago la junaj germanaj esperantistoj alvenis en la vilaĝon.

En la vilaĝa salono la gastoj kaj la komso-molanoj el la agrikultura teknikumo improvizis varian internacian artan programon. Kaj la kantoj de la balkanaj popoloj kaj tiuj de la okcidentaj esprimadis la samajn sentojn kaj dezirojn: pri paca laboro, pri sincera amikeco de la ordinaraĵoj. La gastoj estis prezentitaj al la publiko kaj respondis al multaj demandoj.

Dumtempe, tiuj kiuj ne sukcesis trovi lokon en la salono, scivole observadis la varie orna-

La fondintoj de s-to „Balkana konkordo“

mitan aŭtomobilon de la junaj vojaĝemuloj. Sur ĝi estis pentrita ilia tuta vojo, la naciaj flagoj de la ses traveturitaj landoj, ĉiuj vizititaj urboj kaj la teksto: „Amikeco per esperanto“ — en lingvoj germana, serbo-kroata, greka, turka, bulgara kaj esperanta.

La sekvan tagon, oni adiaŭis kun la bondeziro pri novaj renkontiĝoj dum 1963 en Sofio kaj Vraca de la internaciaj Esperanto-kongresoj.

J. Kalinov

Burgas. La 5-an de septembro nia societo „Nigra maro“ organizis festkunvenon okaze de la nacia festo, la 18-an datrevenon de la liberigo — 9-a de septembro. Prelegon en Esperanto faris k-do Petko Gamiŝev — sekretario de la societo.

P. G.

Karlovo. Por ke ne ĉesu dum la somero la kolektiva vivo de la esperantistoj, la Esp.-societo „V. Levski“ en Karlovo disvolvis aktivan turisman agadon. Dum tiu somero estis organizitaj ekskursoj al la monto-pintoj Botev, Vejen kaj la montodomoj „Balkanaj rozoj“, „Benkovski“ kaj „Vejen“ en Balkanmontaro. Antaŭviditaj estas ekskursoj al monto Persenk en la Rodopoj kaj al Ĉerni Vrah en Vitoŝamontaro.

Juĉn el la ekskursoj la esperantistoj organizas kune kun la loka turista societo. Tiel ili praktike efektivas la kunlaboron inter turistoj kaj esperantistoj. Multaj inter la membroj de la Esp.-societo, kiel la prezidanto — N. Ganev, ing. Nedelĉev, N. Ĝarâkĉiev k. a. estas aktivaj turistoj.




Sur la foto estas videblaj la partoprenantoj en la ekskurso al montodomo „Balkanaj rozoj“ kaj inter ili ankaŭ k-do G. Maĝarov — sekretario de la urba komitato de BKP kaj la vicprezidanto de CK de Bulg. turista asocio — k-do M. Kojuharov.

A. Tanev

Jambol. La 9-an de septembro 1962. La lumradioj de la septembra suno frue matene karesis la urbon, la urbo kiu donis multajn karnajn viktimojn por la libero de la popolo — Angel Valev, Dimităr Jejazkov, la poeto Vasil Karagjov kaj aliaj, la urbo, kiu estis sidejo de sesa partizana zono, kun gvidanto Dimităr Dimov.

Sur la stratoj kaj la placoj de la urbo rapide marŝas miloj da ĝelernantoj, ĝelaboristoj kaj la kulturklerigaj agantoj. Ili havas bonajn laborajn sukcesojn kaj tio ilin ĝojigas.



Kune kun la laboruloj manifestis ankaŭ la esperantistoj el la urbo. En sia agado ili ankaŭ havas bonajn farojn — dek kursojn por la lernado de la lingvo, labortagojn helpe al la agrikulturaj laborkooperativoj, aranĝon de tri propagandaj vitrinoj, semajnajn disaŭdigojn per la urba radio-servo, ekskursojn k. a.

Kiam preterpasis la tribunon kun la oficialaj personoj la esperantistoj kriis: „Vivu esperanto“, „Vivu paco!“ „Vivu la naŭa de septembro“ — la hela festo de la libero!“ En tiu momento la urba servo disaŭdigis: „La esperantistoj estas en la unuaj vicoj de la batalantoj por la paco“, „La jambolaj esperantistoj propandas niajn socialismajn sukcesojn en eksterlando“.

Dimo Trudoljubov

NEKROLOGO

La 16-an de julio 1962, post londa malsano, forpasis k-do Jordan St. Lupov — malnova esperantisto, ekssekretario kaj prezidanto de Esperanto-societo „Radio“ Pazargik. Niajn kondolencojn!

De la societo

Je la invito de BEA mi partoprenis la 35-an kongreson en Burgas, kiel oficiala delegito kaj post la kongreso kiel simpla esperantisto kun kelkaj amikoj mi vizitis Bulgarien.

Do, en kelkaj vortoj ĉi tio estis la programo, sed... jes, sed ĉi tiuj simplaj vortoj enhavas tiom da diraĵoj, ke mi ne scias pri kio mi skribu. Mi sidas ankoraŭ en la ĉambro de hotelo en Sofio kaj tiom da belaj memoraĵoj svarmas en mia kapo, ke ne la skribo, sed la elekto estas malfacila.

La titolo de la artikolo konsistas el tri vortoj: **amikeco**, kiun mi spertis ĉiam kaj ĉie; **kongreso**, ĝi estis vigla, impona kaj fruktodona, kion mi povis konstati; kaj tio tre surprizis min, ke kvankam ĝi estis nacia kongreso, tamen dum la tuta kongreso la oficiala lingvo estis Esperanto. Niaj bulgaraj gesamideanoj ne nur lernis la lingvon, sed ili bone scias uzi ĝin; **maro**, kiu estas neforgesebla, ĝiaj malvarmetaj ondoj, la sablo, vespere la luno kaj la argenta ponto sur la akvo, la murmuro de la ondoj, ili longtempe vivos inter miaj memoraĵoj.

Oni diras, ke la unuaj impresoj estas ĉiam la plej gravaj. Se ĉi tio estas vera, mia unua impresoj estis: Esperanto. Kiam mi alvenis en la flughavenon de Sofio kaj mi iris al la doganejo pro la kontrolo de niaj kofroj, la doganoficisto ridetis kaj esperante diris: „Mi dankas, ĉio estas en ordo.“ Mi estis tiel surprizita, ke unue mi ne komprenis, kion li diris, aŭ kian lingvon li uzis. Ni invitis lin al la kongreso, li deziris al ni bonan vojaĝon kaj ĝoje ni konstatis, ke Esperanto vere estas viva, uzata lingvo.

„Per flugiloj de facila vento“ kaj per la aviadilo de TABSO ni alvenis al Burgas. La hotelo Primorec estis belega, sed la belecon ĉiuj tie loĝantaj povas ĝui. La gastamecon kaj la sincerajn kaj elkorajn manpremojn nur tiuj povas senti, kiuj la saman lingvon parolas kaj kiuj komprenas unu la alian. Kiel neforgeseblaj estos la komunaj tag- kaj vespermanĝoj aŭ en la urbo aŭ apud la maro en la kompanio de niaj karaj bulgaraj gesamideanoj.

Post la kongreso ni faris ekskurson al la „Reĝa rivero“ Ropotamo, al Nesebr, ni banis nin en la „Suna Strando“.

Poste sekvis Varna. Apenaŭ ni elaŭtobusigis, terura bluvego akceptis nin. Ĝi daŭris duonhoron kaj la suno denove brilis, la aero iĝis freŝa. Mi pensas ke la ĉielaj respondeculoj por nia honoro purigis la urbon kaj redonis la freŝecon al la arbaroj kaj plantaroj.

Alaĝa. Mi opinias ke ĝi estas unika en la tuta mondo.

Ora strando. Kion tie la bulgara popolo faris, estas apenaŭ kredebla. La harmonio de la naturo; maro, ora sablo kaj la arbaro. Freŝeco de la maro kaj la freŝeco de la ombraj arbaroj: oni povas ĝui samtempe ambaŭ. Kaj oni ne scias kion rigardi, kion admiri. Tute modernaj hoteloj, sed tamen ne la samaj, ĉiu havas alian karakteron. Ĝi estas vere internacia loko. Ni renkontiĝis kun ĉeĥoslovakaj, orientgermanaj, polaj, hungaraj eĉ kun francaj pioniroj, ni vidis aŭtojn antaŭ la hoteloj el Usono. Pri tia beleco mi ne songis.

Multajn bildojn mi vidis en la „Nuntempa Bulgario“ pri la „Ora Strando“ kaj pri la „Suna Strando“, kaj en Sofio mi ricevis novajn prospektojn pri ili. Sed tiuj estas nur simplaj kaj tre malbonaj imitaĵoj de la realeco. Ili estas senvivaj koloroj. Kaj la plej bela bildo aŭ foto ne povas enhavi la amikecon, la gastamon de la bulgara popolo. Oron mi ne trovis en la „Ora strando“, sed mi trovis ion pli valoran ol la oro: la sinceran amikecon de la bulgaraj geesperantistoj. Pro tio mi skribis unue en la titolo de ĉi tiu modesta artikolo: amikeco.

Sofio, la koro de Bulgario. Ĝi havas tre bonan, sanan koron. Vitoŝa ĉiam sendas la bonan, freŝan aeron, ke la koro restu sana kaj povu bone labori. Sofio havas belegajn parkojn, grandajn domojn kaj la novaj loĝkvartaloj estas imponaj.

Jen kelkaj memoraĵoj pri la dek tagoj. Mi trafolumas mian notlibreton kaj vidas, ke mi apenaŭ skribis ion. Sed kion mi ne diris nun sur la paĝoj de la „Bulgara Esperantisto“, tion mi diros en Hungarujo al ĉiuj perbuŝe.

Venontjare en Sofio estos la Universala Kongreso. La nuna adiaŭo do estas nur provizora. Ĝis tiam ni, hungaraj esperantistoj, kun la sama amikeco atendas vin en nia lando kaj ni esperas ke ne nur ni, sed ankaŭ aliaj multaj hungaraj geesperantistoj povos tiam ekkoni vian belan landon kaj vian pacamantan popolon.

Koran dankon por la belaj tagoj kaj ĝis revido.

Dr Nagy István

ESPERANTO EN NORVEGA LERNEJO

Laŭ la letero de nia kunlaboranto S-ro C. Stop-Bowitz de la 16-a de oktobro, en aŭgusto de tiu ĉi jaro komenciĝis instruado de Esperanto en la 5-a klaso de gimnazio, anglalingva linio, en Sarpsborg. Instruas lektoro Johan H. Rosbach. La kurso estas aprobita de la Instruministerio. Plue, post pluraj klopodoj kaj komenca malsukceso, fine la Instruministerio akceptis la proponon de S-ro Stop-Bowitz, ke en la lernejo Aars & Voss en Oslo, en la 3-a klaso de gimnazio, anglalingva linio, oni instruu Esperanton anstataŭ la franca dum la unuaj 9 semajnoj de la lerneja jaro, tiel ke post tio, nome dum 3/4 de la instrua jaro, oni instruu la francan laŭ la programo. La 4-an de septembro komenciĝis la instruado de Esperanto oficiale kaj devige en tiu klaso. La instruistino pri la franca ĉeestas la lecionojn por lerni Esperanton tiam, ke ŝi poste povu utiligi ĝin en la instruado de la franca. S-ro Stop-Bowitz komencis tiun sukceson jene: „Ĝi signifas ke la glacio estas rompita ĉe la Instrukonsilantaro kaj la Ministerio. Ĝi kreas precedencan, kiu grave faciligos sukceson de similaj proponoj flanke de aliaj lerne-

joj en nia lando. Restas nun, ke niaj lektoroj pri la franca lingvo, kiuj estas esperantistoj, iniciatu similajn eksperimentojn en siaj lernejoj. Estas nun klare ke Esperanto estas permesebla kiel eksperimenta temo en norvegaj gimnazioj.“

SALUTON EL LA BALTA MARO

La redakcio ricevis la jenan lereron: „Tre estimataj gekamaradoj!

Ni, partoprenantaj la kvaran esperantistan ĉebaltan tendaron en Cesiŝ (Latvio), salutas vin elkore kaj deziras al vi grandajn sukcesojn en via fruktodona poresperanta laboro.“

Sekvas multaj subskriboj.

La redakcio de BE dankas al la partoprenintoj en la kvara ĉebalta tendaro en Cesiŝ (Latvio) pri la senditaj salutoj kaj deziras al ili sukcesplenan agadon por paco per Esperanto.

Ni dankas ankaŭ al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj, kiuj gratulis CK-on de BEA kaj la redakcion okaze de la nacia festo de la bulgara popolo la 9-an de septembro.

En ĵurnalo „**Naroden Drugar**“ — Jambol (23. VI. 1962) — informo de D. Ĵekov pri la labortagoj de la esperantistoj el la urbo helpe al la agrikultura mastrumo.

En ĵurnalo „**Ĉernomorski Front**“ — Burgas (11. VII) — artikolo de G. Dimov „Per Esperanto — pli da amikoj de Bulgario“ (dediĉita al la XXXV kongreso de la bulgaraj esperantistoj).

En la sama ĵurnalo (17. VII) — longa artikolo „Ĉiam pli, pli fortaj kaj kolektive agantaj“ (pri la 35-a kongreso, kiu pasis sub la signo de la batalo por paco).

En „**Rabotničesko Delo**“ — Sofia (15. VII) — longa informo de Em. Ivanov pri la inaŭguro de XXXV kongreso de la bulgaraj esperantistoj.

En la sama ĵurnalo (17. VII) — longa informo pri la fermo de la kongreso.

En „**Orjaĥovska Tribuna**“ — Orjaĥovo (30. VII) — artikolo de Toŝo Raŝ'ov „Saluton, insulo „Esperanto“ kun tri bildoj (belega priskribo de la restadejo sur la insulo kaj la pitoreskaj bordoj de Danubo).

En „**Zavodska Iskra**“ — Pazarĝik (6. VIII) — longa propaganda artikolo de Konstantin Genĉev „Esperanto-lingvo de la amikeco kaj la paco“.

En „**Iskra**“ — Kazanlâk (18. VIII) — artikolo de Iv. Zăhariev „Ekskurso al la plej alta montosupro de Balkanmontaro“. La aŭtoro rakontas pri la vizito de montosupro „Botev“ kaj la tombo de la partizano-heroo Nedelĉo Nedelĉev-Jan. La ekskursosolenajon partoprenis esperantistoj el Kazanlâk, Karlovo, Plovdiv, Pazarĝik, Pavlikeni kaj aliaj urboj.

En „**Septemvrijsko Zname**“ — Pazarĝik (18. VIII. 1962) — longa artikolo speciale ver-

kita por la ĵurnalo de la itala esperantisto, gasto al la 35-a kongreso Filipo Franĉeski „**Trezoroj de la arto kaj de la homaro**“. La aŭtoro rakontas arde kaj verve pri la festivalo de la popolaj kantoj kaj dancoj apud vilaĝo Batak je 11–12 aŭgusto j. k.

En la sama ĵurnalo (5. IX) — longa artikolo speciale verkita por la ĵurnalo de Filipo Franĉeski „**Pazarĝik — florgardeno**“. La aŭtoro rakontas patose pri la rimakindaĵoj de la urbo.

En „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (23. VIII) — anonco pri apero de „**Lernolibro de Esperanto**“ de Iv. Sarafov kaj Sim Ĥesapĉiev, eldonita de Ŝtata Eldonejo „**Scienco kaj Arto**“.

En la sama ĵurnalo — informo ke la sama eldonejo intencas eldoni en 1963 „**Esperanto-bulgaran konversacilibron**“.


En „**Narodna mladej**“ — Sofio (24. VIII) — artikolo de L. Kantarev „Post mi venas mi loj . . .“ — bonega skizo pri la vivo kaj morto de la heroo-esperantisto Botjo Penev el vilaĝo Katrangik, regiono de Drjanovo.

En „**Literaturni Novini**“ — Sofio (9. VIII) oni publikigis tre interesan leteron de la hinda esperantisto Svami Anuruddha, kiu letero estas nova pruvo, ke la popoloj, speciale la hinda kaj la bulgara, volas vivi en paco kaj frata interkompreniĝo, pri kio kontribuas pleje nia internacia lingvo Esperanto.

Rimarkigo.

Ni petas ĉiujn societajn estrarojn kaj apartajn esperantistojn sendi al la redakcio ĉiujn numerojn de lokaj ĵurnaloj kaj gazetoj, en kiuj estas publikigitaj materialoj, rilatantaj nian movadon aŭ la lingvon Esperanto.

Problemo № 2



Mato en du movoj

Pro allasitaj preseraroj ni represas la saman problemon de № 7-8

Kontrolo:

Bl. Rd8, Dh4, Td1, Ĉa5, Ĉc4, Kb4, Kh1, p: d7, f4

Ni: Rd4, Dd2, Tc1, Ĉd3, p: b5, f5, g7

Solvojn sendu ĝis la 15-a de novembro

HUNGARIO

S-no Sándor Szinovsky, 35-jara direktoro de presejo, Liszt F. K. 7., Dunaujváros — nur kun seriozaj presistoj, desegnistoj, fotistoj presfakaj laboristoj dez. kor. per leteroj, belaj koloraj bildkartoj. Multaj temoj interesas. (Vojaĝoj, gazetoj, libroj, revuoj ktp.).

S-ano János Greguss, Frangepán u. 19, Dunaujváros — 26-jara fraulo, elektromuntisto, kun gejunuloj; interesas alumetetikadoj, ŝakludo kaj gazetoj, insignoj E., aliaj esperantaĵoj.

F-ino Anna Horváth, Szórád M. u. 18.1. 3 — 19-jara teksajvendistino, interesas belaj panorambildoj, fotoj, revuoj, vojaĝoj, libroj ktp. (komercantino) el urbo Dunaujváros.

István Sztankó, Boeskaí u. 2. II. 2, Dunaujváros — 34-jara elektroteknikisto, sekretario de „Progreso E. Rondo“. Interesas seriozaj korespondamiko el la tuta mondo. Tre multaj temoj interesas: turismo, vojaĝoj, pacmovado, ĉiuj esperantaj novaĵoj el la mondo. Bele afrankitan leteron petas!

István Braunmüller, Frangepán u. 19, Dunaujváros — 22-jara tajloro (en unu vestajfabriko laboras) — kun gejunuloj pri ĉt: vojaĝoj, turismo, gazetoj, insignoj ktp.

János Pető, Vörösmarty u. 15. III. 1, Dunaujváros — 51-jara fervojisto, malnova esperantisto, precipe kun samfakuloj el Bulgario kaj ali j landoj.

István Márton, Kossuth u. 20. I. 3, Dunaujváros — 17-jara lernanto. Interesas belaj panorambildoj, bona amikeco kun fremdlandaj lernantoj per leteroj bele afrankitaj.

Emil Mété, Boeskaí u. 2.C. i. 2, Dunaujváros — 35-jara oficisto, kiu korespondas ne nur kun samfakuloj: pri botaniko, turismo, vojaĝoj, libroj, revuoj, naturo, Esp. tradukaĵoj, insignoj. Bele afrankitajn leterojn sendu.

JUGOSLAVIO

Milatović Katarina, želj., stanica-Rimski Jančevi, poŝ. ĉenej- 19-jara instruistino, kun bulgaroj.

ITALIO

24-jara oficistino deziras korespondi kun ĉ. l. pri ĉt. f-ino Marlene Agostini, Via Setala 3, Milano.

POLLANDO

Stanisław Mlochowski, Dobrzelin (poczta Zychlin, pow. Kutno) — kun bulgaroj; PM, Pl.

Jan Jasinski, ul. M. Buczka 3, m. 12, Lomza (woj. Białystok) — kun junuloj el Bulgario; kantoj, PM, Pl.

Zbigniew Stroczo, Lignicka 1/3 m. 41, Gdansk — pri arthistorio, arkitekturo, teatro, muziko, filmoj.

Elizabeta Holownia, Gdansk-Wrzeszcz, ul. Jaskowa Dobina 18 b/14.

VIETNAMIO

Nguyễn Lộc (lernanto, 17-jara), 49 str. Trần hưng tao, Nam-dinh — kun bulgaroj.

6-a INTERNACIA SEMINARIO DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Inter la 27-a de decembro 1962 kaj la 2-a de januaro 1963 en la moderna junular-gastejo de RÜSSELSHEIM/Main, GEJ organizas sian tradician Internacian Seminarion, ĉi-jare je temo: „ĈU NACIISMON SEKVOS INTERNACIISMO?“. En la kadroj de la ĉeftemo prelegos pluraj fakuloj pri: historio de naciismo, misevoluoj, specialaj formoj, naciismo en nia nuna konscio, provoj venki naciismon k. s. La prelegojn sekvos diskutadoj. Krome okazos akcepto en la urbodomo, vizito al la urbo, ekskurso al Frankfurt, lumbild-prezentadoj kaj novjara balo.

Kotizo: La kotizo, kiu inkluzivas la loĝadon, ĉiujn manĝojn kaj seminariajn aranĝojn estas por junuloj ĝis 25-jaraĝaj 50 GM kaj por pliaĝuloj — 60 GM.

Aliĝo: Por aliĝi bonvolu indiki viajn nomojn, precizan adreson naskiĝdaton kaj profesion al Germana Esperanto-Junularo, 29 Oldenburg, Am Festungsgraben 53. Antaŭpago de 10 GM estas dezirinda. Limdato por aliĝo — la 5-an de nov. 1962.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro) Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Vasilka Petrova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01

НОВА АБОНАМЕНТНА СИСТЕМА

Обръщаме вниманието на дружествените ръководства, на нашите настоятели и активисти, на всички есперантисти, че за 1963 г. абонирането за „Bulgara Esperantisto“ ще става чрез РЕП, т. е. чрез местните пощенски клонове. Това не само не сменя отговорността за абонирането от дружествата, но напротив — я засилва. Както е известно представителите на РЕП в пощенските клонове приемат абонаменти само до 20 декември. Ето защо дружествата трябва да проведат широка, разяснителна, агитационна и организаторска работа за новия начин на абониране и веднага да пристъпят към събирането на самите абонаменти. В случая дружествата ще действуват като настоятели на РЕП — ще събират абонаментите и ще ги внасят в пощата, за което ще получават определения процент.

Ние особено обръщаме вниманието на нашите активисти върху факта, че есперантистите са свикнали да протакат абонирането. За това ние сигнализираме за опасността да бъде намален броя на абонатите през тази година. Ние в никакъв случай не трябва да допуснем това.

Абонаментната кампания трябва да започне веднага. В определения срок трябва да не остане нито един есперантист не обходен и не абониран. Ръководствата, както в миналото, да съобщават на редакцията за проявили се в кампанията другари, за да им бъдат публикувани имената. Нека да си поставим за задача предсрочно до 1. XII да абонираме всички наши членове, всички есперантисти от град или село, всички наши курсисти.

Редакцията ще обяви имената на всички активисти, на всички дружества, които добре се справят с тая благородна задача.

Абонаментът остава както до сега: за година — 1,40 лв., за полугодие — 0,70 лв.

Чрез пощата ще се абонира и за следните списания:

„Paco“ (годишно 12 книжки) — 1,20 лв.

„Internacia Ĵurnalisto“ (годишно 4 книжки) — 1 лв.

За чужбина абонаментът е:

за Албания, Полша,	за всички
Румъния, Унгария,	останали
Чехословакия и	страни
Югославия	

„Bulgara Esperantisto“	1,52 лв.	2,00 лв.
------------------------	----------	----------

„Paco“	1,32 лв.	1,80 лв.
--------	----------	----------

„Internacia Ĵurnalisto“	1,04 лв.	1,20 лв.
-------------------------	----------	----------

Тия списания се намират в каталозите на РЕП под поредни номера: 163, 164, 165.

Забележка. В каталозите погрешно са дадени цените „за всички останали страни“, но с окръжно до местните клонове, ще бъдат оправени.

Както до сега и тая година пощите ще приемат абонаменти за „El Popola Ĉinio“, „Vietnamio antaŭenmarŝas“ и „Pola Esperantisto“.

Срокът за тия списания е до 10 ноември.

От редакцията